

*Sonoriloj super tero,
el la turoj kantu vi
pri kristnasko kaj espero:
Al la homoj pac' de Di'!*

*Kantu, kantu, sonorilo:
al la mondo kantu, ĉar
nun alvenis Dia Filo,
Di' ridetas al homar'!*

*Donu vian amon, Dio,
al fidantoj sur la ter',
ke en via eklezio
ekmontriĝu via ver'.*

*Batalemon, ho Jesuo,
miskomprenojn prenu for,
kreu el la ar' unuo,
la armeon de l' Sinjor'.*

*Tial tintu, milde tonu,
ĉie voku al la kor',
ke l' homaro ĉie konu
pacon de l' kristnaska hor'!*

*Kantu, kantu, sonorilo:
al la mondo kantu, ĉar
nun alvenis Dia Filo,
Di' ridetas al homar'!*



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420311241406;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- • pagante al
Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA
por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de
'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Kristnasko	123
Vesperpreĝo de la berlina nederlanda ekumena komunumo	125
Ĉu vi komprenas tion, kion vi legas? Kaj ...?	129
Oni preĝas, la pluvoj venas	130
Kristoforo, sanktulo kaj legendo	132
Siegfried Krüger 80-jara	133
Antonín Zhoř	134
Rapida vizito al Romo	136
Mi tradukis el Dia Regno	137
Modra	138
Huteranoj	139
Kotizoj por 2016	140
Kvodlibeto	142
Vizito al Britta Rehm	142
Ĉu vi scias - kaj kion ci diras pri:	143
Mia preĝo	144

Redaktoraj vortoj

Skribante tiujn ĉi vortojn je la fino de
la jaro, mi iom retropensas pri kelkaj
okazaĵoj dum la aŭtuno, inter alie pri la
atakoj en Parizo, la homa kaj media
katastrofo en Brazilo sekve la diga
rompiĝo, la klimata kunveno en Parizo
kaj la rifuĝantaj/migrantaj katastrofoj
plurloke en la mondo. Eble vi pensas
pri ankoraŭ iu alia okazaĵo. Ni nun
preparas la kristnaskfeston. Per kiuj
pensoj kaj sinteno ni preparas ĝin?
Espereble kun granda ĝojo, ĉar Krist-
nasko estas Bona Mesaĝo – la bona
mesaĝo por mi, ni, por la tuta mondo.
Tiu mesaĝo ankaŭ devigas min, kaj nin,
iel agi. Eble ni ne estas ‘granduloj’, sed
eble ion malgrandan ni povos fari por
ke iuj, ne same bonŝancaj kiel ni, povu
sperti la Kristnaskan ĝojon kaj pacon.

Havu belan Kristnaskon! ☺

Kristnasko

Philippe COUSSON, FR

Nuntempe, en preskaŭ ĉiuj landoj, Kristnasko estas ĝenerala festotago, kun multaj ornamaĵoj, lumoj, kandeloj, ludiloj, festenoj, ktp. Eĉ en landoj kie kristanismo tute ne estas la religio de la plimulto.

Multaj kristanoj plendas ke perdiĝis la origina signifo de Kristnasko. En Esperanto la ligo aperas evidenta, *Kristnasko* temas pri Kristo, sed en aliaj lingvoj, la ligo tute ne estas evidenta. Eĉ en lingvoregionoj kie la nomo de la festo enhavas la vorton Kristo, troviĝas pli kaj pli da homoj kiuj ne faras la ligon kun religio. Por multaj Kristnasko estas la festo de la infanoj, la vintra (en la norda hemisfero) familia festo.

Ĉu tiu diskonektiĝo inter Kristnasko kaj Kristo estas skandala? Laŭ mi, ne. Mi klarigos.

Kiu estas la ĉefe vidata rolulo de la festo en nia epoko? Kristo? La bebo Jesuo? Certe ne. En Francio nun, kaj eble ne nur en Francio, troviĝas homoj kiuj malakceptas vidi en publikaj lokoj kripon, kun la bebo, Maria, Jozefo, la anĝeloj, la saĝuloj, la bovo kaj la azeno, kaj multaj aliaj figuretoj. Pro tio, ke tio estas konfesia. Ili ne agnoskas la tradiciojn lokajn pri ili. Sed tiuj samaj homoj kompreneble festas la festotagon, festenas, aĉetas donacojn por la infanoj, vojaĝas al la familio.

Kiu estas la ĉefa rolulo vidata dum tiuj tagoj ? Li havas diversajn nomojn, kun diversaj tradukoj en Esperanto, ĉu Sankta Nikolao, ĉu Paĉjo Noelo, ĉu Avo Frosto, aŭ eble aliaj kiujn mi ne konas. La vestaĵoj estas la samaj ĉirkaŭ la mondo. Tiu havas historion.

Alia simbolo de tiu festo estas la abio. Tio ankaŭ havas historion.

Jen nia nuna konsumisma festotago.

Tamen, ĉu ĉi tiu festotago ne estas de la komenco festotago pri Jesuo? Efektive ne.

... ni ne forgesu heroldi la signifon kiun ĝi havas por ni, la gravecon kiu havas por ni la renkonto persona ĝuste kun Jesuo Kristo

En la komenco de la Eklezio la nura festotago estis la unua tago de la semajno, la tago de la releviĝo de Kristo. Ĉar en la komenco la plimulto de la kristanoj estis ankaŭ Judoj, ili daŭre festis la judajn festotagojn, kiujn iom post iom ili “kristanigis”. Tiel estiĝis la kristanaj festoj de Pasko, Pentekosto. Ankoraŭ ne aperis la bezono festi la naskiĝon de Kristo.

La disvolviĝo de la penso pri Jesuo Kristo sekvis evoluon, kiu estas reŝpegulita en la diversaj ekleziaj tekstoj. La ĉefa temo estas, kaj restas, la graveco de la kerno-tempo Kruco–Pasko–Pentekosto, kiu indikas la naturon kaj rolon de Kristo en la ekonomio de la savo.

La teologoj venis rapide al la konkludo, ke, ĉar Jesuo Kristo estas kaj homo kaj Dio, li naskiĝis. Tiu temo ne aperis en la unuaj tekstoj de la Nova Testamento (Paŭlaj epistoloj, la Evangelio laŭ Marko) sed baldaŭ en postaj (Mateo kaj Luko) kaj ankaŭ pli grand-skale en apokrifaj malfruaj evangelioj. Ni do havas diversajn raportojn pri tiu naskiĝo, kaj nenio en la kanonaj tekstoj pri la junaĝo kaj komenco de la plenaĝa vivo. Tamen, neniu festotago.

Kiam do ĝi aperis? Fakte sufiĉe malfrue. En la 3-a kaj 4-a jarcentoj, por kontraŭstari la paganajn festotagojn, la disvastiĝanta kristanismo post hezitaj decidis anstataŭi la feston de la venkanta Suno (Sol invictus) per la celebros de la vera venkanto, nome Jesuo Kristo. Tial estis elektita dato proksima al la solstico. Tiu kosma evento de la denova plilongiĝo de la tagoj, sekve, de la venko de la lumo, de la suno, lasis spurojn en nia maniero festi Kristnaskon.

Ni uzas multajn lumojn, ni festas arbon ĉiam verdan, kiun ni eĉ transformas en la edenan arbon de la vivo kun alkroĉitaj fruktoj. Simboloj, multaj simboloj estas uzitaj. Sed kiel la antikva simbolo, rompita peco de poto aŭ de monero, kiu signas kontrakton kun la

rekonmeto, niaj Kristnaskaj simboloj havas signifon, nur kiam oni alproksimigas la duan pecon. Kaj por multaj tiu dua peco malaperis aŭ estas anstataŭita de io alia. Sed ĉu ne la samo okazis kiam la kristanoj alproprigis tiun feston, kies signifon ili ŝanĝis ?

Konklude, ni ĝoje kaj fide festu Kristnaskon, kiel la festotagon de la enkarniĝo de la Filo de Dio kiu poste mortos kaj releviĝos, kiu estas por ni *La lumo*, kiu estas por ni La suno de justeco, kiu postulas de ni fariĝi ankaŭ por la homoj lumo, justeco. Sed ni ankaŭ akceptu ke la aliaj donu al tiu festotago alian signifon, kiel niaj antaŭuloj jam faris kun alia festotago. Tamen, ni ne forgesu heroldi la signifon kiun ĝi havas por ni, la gravecon kiu havas por ni la renkonto persona ĝuste kun Jesuo Kristo. Ni alportu al la homoj la duan pecon de la festo kaj de la simboloj de Kristnasko.

☞



Philippe COUSSON dum la ekumena kongreso 2015 en Strasbourg

Vesperpreĝo de la berlina nederlanda ekumena komunumo

En la berlina franca katedralo, la 4-a de januaro 2015

Predikis Giselher HICKEL

Tradukis Peter BÄSS

Abundo da tradicio kaj simboliko ĉirkaŭas nin je la kristnaska festo. Krom lumo ankaŭ nutraĵo ludas gravan rolon en ĝi. Ĉi-jare mi aparte rimarkis spickukajn dometojn. Multfoje oni trovas ilin sur kristnaskaj foiroj kaj en infanĉambroj. Interrete aĉetante, oni jam por € 11,99 ricevas propramane konstruendajn “krakete manĝeblajn sorĉistindometojn”.

La mielkuka dometo devenas de fabelo “Hänsel und Gretel” [Joĉjo kaj Margenjo]. La unua versio fare de fratoj Grimm el la jaro 1812 estis rakonto por plenkreskuloj. La teksto nur depost la 2-a eldono de la KINDER- UND HAUS-MÄRCHEN [Infanaj kaj hejmaj fabeloj] estis pli kaj pli konformigita al infanoj kaj sentimentaligita. La sorĉistina domo – originale konsistanta el pano, kuko kaj sukero – estas simbolo de riĉeco. Ĝi akre kontrastas kun la malriĉega kabano de arbohakisto, el kiu vid-al-vide de la malsatmorto, kiu minacas la tutan familion, la infanoj estis forpelitaj de la propraj gepatroj en necertecon. La du neplenaĝaj fuĝantoj, erarvojaĝante tra

la sovaĝejo trovis tiun insulon de abundeco, la domon, superfluanta de luksaj manĝaĵoj.

Sed baldaŭ ili amare spertas, ke la riĉeco montriĝas danĝera iluzio. Malkovrinte, ke la bonstato baziĝis sur hom-oferado – supraĵe kamuflita kani-balismo – ilia ĝojo pri savo subite transformiĝas al malespero. Por protekti la enkarcerigitan fraton kontraŭ ŝovado en la bakforon, Margenjo fariĝas teroristino. Ili ambaŭ eskapas, ŝarĝitaj per riĉaĵoj, ŝtelitaj el la trompe luksa vilao. Eĉ en romantike bidermajra* masko la fabelo tradicias la mesaĝon pri seniluziigo de la abundeco.

“Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu!” Aprobindas tio koncerne kaj fabelojn kaj bibliajn rakontojn. Fabeloj simile kiel bibliaj rakontoj ege proksimas al ĉiutageco kaj samtempe montras trans ĝin. Nenio estas pli ĉiutaga ol manĝado. Pro tio en la Biblio ofte estas la parolo pri pano. La peto pri pano estas la centro de la Patro Nia. Kaj la centra sakramenta simbolo de la eklezio, konservata en la rito de la

* Bidermajro oni nomas la epokon ekde 1815 (Viena kongreso) ĝis 1848 (Revolucio de 1848 en Germanio) en la landoj de la Germana Federacio kaj de la Aŭstra imperio. Kun la esprimo bidermajro ligiĝas en la politika historio la nocio de la restaŭrado, kiu rilatas kun la ŝtatpolitika evoluo post la fino de la napoleona epoko kaj la Viena kongreso. La nocio estas grava kiel epokonomo de la kulturhistorio. /El Vikipedio

Sankta Manĝo – la Eŭkaristio – estas manĝo, kiu siaflanke devenas de la juda paska manĝo, per kio la biblia pra-sperto – la liberigo el la sklaveco – estas rite celebrata.

Kiel bibliaj tekstoj por tiu ĉi vesperpreĝo ni aŭdas el la evangelio laŭ Marko du rakontojn pri manĝado (Marko 6,32-45 + 8,1-9). Laŭ ambaŭ tekstoj mankas pano. Kun la prediko de Jesuo tio ligitas duoble. Unue oni sciis, ke laŭ la sekvo de rakontitaj okazaĵoj laŭ la evangelio de Marko Jesuo tiutempe jam estis persekutata. Liaj predikoj estis kaŭzintaj skandalegon. Precipe liaj simbolecaj agoj kaŭzis ekscitiĝon. Li sanigis homajn malsanojn sabate, malatentante la judajn ordonojn pri sabato kaj pureco – ne ĉar li malakceptis ilin, sed ĉar li atakse la religiaj reguloj ekzistas por la homoj, ne la homoj por la reguloj. Li altabliĝis ekzemple kun pekuloj kaj romiaj doganistoj kaj kun ili manĝis. Konservativaj judoj tion opiniis mortomerita peko. Marko jam en la 3-a ĉapitro sciigas pri komuna murdkomploto de judaj romiaj

aŭtoritatoj.

Ekde tiam Jesuo kaŝiĝis. Li neniam longdaŭre restis en unu loko. Li ŝanĝadis de unu al la alia bordflanko de lago Genezaret. Li retiriĝis post ĉiu publika elpaŝo. La homoj do ne povis ariĝi sur la foirejoj por aŭdi lin, sed nur en malproksimaj sovaĝaj lokoj. Ĉiuspeca infrastrukturo tie mankis – kaj sekve ankaŭ nutraĵo.

Due: Marko detenas de ni la enhavon de la predikoj. Ili laŭdire estis longaj – foje tutan tagon, foje eĉ tri tagojn. Dum Mateo riĉe garnas la Surmontan Predikon per ekscitaj enhavoj, Marko centras la tutan okazaĵaron al la impresa simbola agado je la fino: la granda komuna manĝado. Ne ĝenu nin, ke ĝi ŝajne pasas ne tute konvinke. La disdonado de 5 panoj simbolas la 5 librojn de Moseo, kaj 2 fiŝoj – Moseon kaj la profetojn. Jen kion Jesuo la tutan tempon predikis – la Toraon, Moseon kaj la profetojn. Kaj tiel ilin disdonas, ke finfine pleniĝas 12 korboj, simbolantaj la 12 tribojn de Izraelo, la tutan popolon.

Kaj ili foriris per ŝipo al dezerta loko por esti solaj. 33 Kaj multaj vidis ilin foriri kaj komprenis, kien, kaj piede ili iris tien el ĉiuj urboj kaj alvenis antaŭ ili. 34 Kiam li eliris li vidis grandan amason, kaj li ekkompatis ilin, ĉar ili estis kvazaŭ ŝafoj sen paŝtistoj. Kaj li komencis instrui al ili multege. 35 Jam estis tarde, kiam liaj lernantoj venis diri: Estas dezerta loko tie ĉie kaj jam tardas. 36 Lasu ilin iri, por ke en la agroj ĉirkaŭe kaj en la vilaĝoj ili aĉetu al si manĝi. 37 Li respondis al ili: Vi donu manĝi al ili. Kaj ili diris: Ĉu por ducent denaroj, ni iru aĉeti panojn por doni al ili manĝi? 38 Sed li diris: Kiom da panoj vi havas? Ek, rigardu! Kaj post enketado ili diris: Kvin, kaj du fiŝojn. 39 Kaj li petis ilin, ke ĉiujn ili kuŝigu po manĝgrupoj sur la verda herbo. 40 Kaj ili ekvidis en laŭgrupe je centoj kaj kvindekoj. 41 Li prenis la kvin panojn kaj la du fiŝojn, rigardis supren al la ĉielo, elparolis la benon kaj rompis la panojn kaj donis al la lernantoj, por ke ili disdividu inter ili; ankaŭ la du fiŝojn li diserigis inter ĉiuj. 42 Kaj ĉiuj manĝis kaj satiĝis. 43 Kaj ili kolektis dek du korbojn da rompaĵoj, kaj ankaŭ de la fiŝoj. 44 Estis, kiuj manĝis de la panoj, kvin mil viroj. 45 Kaj tuj li devigis la lernantojn enŝipiĝi kaj jam transiri al Betsaido; intertempe li forsendos la amason.

Marko 6,32-45 laŭ la traduko de G. Berveling

Ke Jesuo predikas Toraon, ne surprizas. Sed kiel li eksplikis ĝin? Marko ne klarigas tion, sed demonstros ĝin helpe de la demando de liaj ĝelernantoj: *De kie ni ricevos panon? Zorgeme ili pripensas la proksimaĵon: la homoj devas reiri en la ĉirkaŭantajn vilaĝojn, al la bazaroj – al la merkato, reen en la normalan ekonomion. Sed Jesuo havas en sia menso alian normalaĵon: *Donu vi al ili manĝaĵon!* Li ne parolas pri aĉetado, sed pri distribuado/ disdonado (cetere ankaŭ ne pri donacado). Sufiĉos, kio surloke troviĝas – kaj ne sole por nur transvivi, sed por bona vivo “je plena sufiĉo”, kiel Johano (10,10) ĝin vortigas. La kolektitaj paneroj tion signifas. Kompreneble tiucele socia strukturo estas bezonata. Al tio Marko aludas per la alvoko de Jesuo, ke la amasoj sin organizu kiel manĝokomunumoj po 50 kaj po 100, kiel pasintece dum la tradezerta libereca marŝo.*

Marko rakontas la okazaĵon ne erare dufoje. Ja ne estas la tutsama okazaĵo. La ripeto okazas en alia loko, translime, en najbara pagana norda regiono. Kaj la nombroj, per substreko de la 7 – cifero

de la plenumo – kaj per la 4 – en ĉiujn ĉielajn direktojn montranta cifero – eldiras, ke tiu anonco plie ol nur nacie validas. La ekonomio disdonema de Jesuo jam dum la romia globaligo ne celis al la nacia komunumo, sed al la komunumo de la popoloj. Ekumena alternativo kontraŭ la imperieca ekonomio romia.

La mesaĝo de Jesuo reprezentas tre simplan kaj tiele konvinkan radikalismen. Ĝi estas ekonomio de disdonado kaj de sufiĉeco. Same tion komprenigas la raportoj pri la tutmonda nutrado fare de la UN kaj fare de ĉiuj fidindaj fontoj de la neregistaraj organizoj:

- 1) La nutrado de la tutmonda loĝantaro dependas de la distribuado de nutraĵo inter la popoloj kaj ene de ĉiu lando.
- 2) La disponeblaj nutraĵoj sufiĉas por nutri la homaron.

Ne estas helpa, sed malproduktiva la ĉiam plia produktado fare de ĉiam pli grandaj agroindustriaj entreprenoj, uzantaj ĉiam pli multe da tekniko kaj energio. La ekzistantaj malgrandaj agronomiaj kaj kompletigaj kooperativaj strukturoj ne nur sufiĉas, sed – kondiĉe, ke ili povas mastrumi en socia medio, en kiu

En tiuj tagoj, kiam denove kunestis granda amaso kaj ili havis nenion por manĝi, li kunvokis la lernantojn kaj diris al ili: 2 Mi kompatas tiun amason, ĉar jam tri tagojn ili estas ĉe mi kaj ili ne havas, kion manĝi. 3 Kaj se mi forsendas ilin malsataj hejmen, ili survoje svenos. Krome kelkaj venis de malproksime. 4 Kaj respondis al li liaj lernantoj: De kie oni povus nutri ilin per panoj en ĉi dezerto? 5 Kaj li demandis al ili: Kiom da panoj vi havas? Ili respondis: Sep. 6 Kaj li ordonis al la amaso sidigi surtere. Kaj li prenis la sep panojn, dankodiris, rompis kaj donis al siaj lernantoj por disdoni, kaj ili disdonis al la amaso. 7 Ankaŭ kelkajn fiŝetojn ili havis; kaj li benis ilin kaj diris, ke ankaŭ tiujn ili disdonu. 8 Kaj ili manĝis ĝisstate; kaj ili kolektis la restantajn rompaĵojn: sep korbojn. 9 Estis ĉirkaŭ kvar mil homoj. Kaj li forsendis ilin. 10 Kaj tuj kun la lernantoj li eniris la ŝipon kaj iris al la regiono de Dalmanuta.

Marko 8,1-9 laŭ la traduko de G. Berveling

la socialaĵoj ne rangas malsupre de la privataĵoj – pli bone taŭgas.

Ankaŭ ne helpas – ni spertas tion ĉiutage – ĉiam pli supersarĝi la superbazarajn bretarojn ĉu per fabelaj spicukoj kaj sukeraĵoj, ĉu per jogurtaĵoj, salatsaŭcoj kaj sennombraj specoj de pano ... Profitema abundo produktas servutan dependecon, ne liberecon de la konsumo, kaj neeviteble malabundon tie, kie ŝancoj por profiti – t.e. la aĉetpovo – malpliĝas. La viveliksiro de konkurenca ekonomio estas malegaleco. Disdonado estas la malo de akumulado, kaj “sufiĉa” – en la senco de racia kontentiĝemo – estas la malo de profito.

Aĵo pli ĉiutaga ol pano ĉiutaga ne ekzistas. Nenio estas pli memkomprenebla ol la distribuado de la pano, por ke ĝi sufiĉu por ĉiuj. Kelkaj el inter ni esprimas tion per ĉetabla preĝo. Aliaj atente kontrolas la “de kie?” kaj “kiel?” kaj “kiom?” de sia nutraĵo; ili prizorgas, ke nenio pereu kaj ili reduktas la konsumadon de viando.

Kromaj aliaj batalas por atingi la kapojn kaj korojn de la homoj – de

politikistoj, de demokratiaj plimultoj, por ke oni finfine mondscale donu la preferon al la disdonado anstataŭ al ekonomia kreskado. Sur ĉiaj niveloj temas pri subfosado de la neoliberal-kapitalisma bazo de nia socio. Ĝi cetere en nia konstitucio tute ne estas ankrita. La batalado kontraŭ ĝi ne estas puninda, sed laŭ mia kompreno kristane kaj demokratie postulinda.

Resumo: La diferenco inter la fabelo kaj la evangelio laŭ Marko estas tia: La fabelo serĉas solvon enkadre de la brutala realo. Joĉjo kaj Margenjo sole perforte povis reciproki la perforton. La propono de Jesuo estas ne nur radikala, sed ankaŭ racia: disdonado preferindas al konkurencado, kaj “sufiĉeco – abundeco – kontentiĝemo” estas la kondiĉo, por ke ĉiuj havu sufiĉon. Sed tiu speco de racio eble bezonas kredon – kredon nian, ke alternativa mondo, alia socio eblas, ke alia Germanio eblas, kaj eĉ eblas alia eklezio.

☪

HICKEL studis protestantan teologion ĉe la Karl Marx Universitato en Leipzig kaj estis ordinita pastro.

Hickel nuntempe estas aktiva en la Nederlanda Ekumena komunumo en Berlino kaj estas estrarano de la Asocio de Amikoj de Hendrik Kraemer domo.

Hickel vivas en Berlino. Ekde mez-marto 2010, li agadas en Palestino, kie li laboras kiel oficisto de programo de la Monda Konsilio de Eklezioj: "Ekumena Akompano Programo en Palestino kaj Israelo".



Ĉu vi komprenas tion, kion vi legas?

Kaj... ?

(Agoj 8:30)

Philippe COUSSON. FR

Tiel estas la moto de nia baldaŭa kongreso en Bratislavo. Ĝi entenas plurajn demandojn. Ni pripensas la diversajn manierojn, kiujn ni uzas kiam ni legas la Skribojn, la Bibliion. Ni pripensas ankaŭ la influon kiu havas tiun legadon sur nia vivmaniero.

Kio estas por ni tiu teksto? Kio estas por ni ĝia aŭtoritato? Ĉu ĝi estas por ni fonto kaj inspiro por la ĉiutaga vivo?

Ĉu nia legado de la Biblio havas influon sur nia rigardo al nia nuna mondo, al la problemoj kiujn spertas multaj homoj proksime al ni kaj malproksime de ni? Ĉu en niaj decidoj rolas ankaŭ tiu legado ?

Tiu ĉi versiklo troviĝas en la rakonto kiam la diakono Filipo renkontas la Etiopon kiu revenas al sia hejmo legante la rulaĵon de Jesaja. Li estis leganta la pecon (Jesaja 53:7-8) kie la kristanoj vidis tuj la anoncon pri la morto de Jesuo Kristo. Post tiu peco venas aliaj ĉapitroj, kiel 56 *“Gardu justecon kaj faru bonon”* aŭ 58 *“Vi disŝiros la ligilojn de malpieco, disbatos la katenojn de sklaveco, liberigos la prematojn...”*.

Legi la Sanktan Skribon ne nur signifas aŭdi bonan novaĵon por si mem, sed ankaŭ ricevi respondecon por la alia, plenumi bonon kaj justecon.

Mi ankaŭ pensas pri alia Biblia rakonto. Legisto volis tenti, testi Jesuon. Li faris al Jesuo la demandon: *“Kion mi faru por heredi eternan vivon?”* al kiu Jesuo respondis per demando iamaniere simila al tiu starigita de Filipo: *“Kio estas skribita en la leĝo? Kiel vi legas?”*

Por respondi al la demando: *“Kion ni faru?”*, ni bezonas respondi al la demando *“Kiel ni legas?”*

Estas certe multaj manieroj legi la Bibliion, multaj teknikoj por bone kompreni la eblajn signifojn laŭ la lingvo kaj la kunteksto. Tio certe permesas respondi al la demando: *“Ĉu vi komprenas?”* Sed ni bezonas iri pluen. Ni bezonas klarigojn kaj instigojn por vivi, kaj ne nur por celi la eternan vivon, ĉar cetere ni ricevas ĝin grace, sed por vivi bonon kaj justecon. Nia sorto ne estas *“vivi laŭeble plej bele”* sed plej bone. La belecon kaj la feliĉon ni ricevos krome, kiel gracon, kiel donacon.

Estas utile bone kaj efike legi la Skribojn, sed estas pli utile praktiki kion ni legas.

*Ĉu vi komprenas tion, kion vi legas?
Kaj... ?*



Oni preĝas, la pluvoj venas

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Dum la tuta historio de la homaro, la senpluveco estas unu el la katastrofoj plej timigaj. Sen pluvo, ne estas rikolto. Sen rikolto, neniu manĝas. “Ĉiuj laboroj de homo estas por lia buŝo.” (La Predikanto 6,7) En ĉi tiu letero mi raportas pri okazoj kiam Dio sendis pluvon por respondi la preĝojn de Sia popolo. Mi ĉerpas la informon de la unuaj kvin raportoj el la libro ‘*Mega Shift*’ (‘Mega Ŝanĝo’) de James Rutz, paĝoj 7 kaj 43.

ĈINIO: En la jaro 1999 ne pluvis en nordaj provincoj dum KVIN JAROJ. Ĉina kristana pastro vojaĝis tra la regiono de la senpluveco kun vizitantaj usonanoj kaj ĉinaj oficistoj. Subite unu el la oficistoj demandis al la pastro: “Ĉu via Dio povas sendi pluvon je malpli ol 20 tagojn?”

La pastro tuj respondis: “Kompreneble Li povas fari tion.”

“Do, preĝu ke tio okazu”, diris la oficisto. “Se pluvos je malpli ol 20 tagoj, ni scios ke via Dio faris tion.”

Dekdu tagojn poste, pluvis sur ĉiuj nordaj provincoj.

TAJLANDO: Je dimanĉo matene en 1996, taja evangelisto Lun Poobuanak direktis diservon por kelkaj kristanoj en budisma vilaĝo en la Kalasin Provinco, Tajlando.

Li estis interrompita pro la alveno de la vilaĝa estro kiu defiis lin: “Pro tio ke la musonaj pluvoj ne venas, la rikolto en nia kamparo estas preskaŭ ruinigita. Se vi petos al via Dio ke pluvu ĉi tiun

monaton, ĉiuj 134 familioj el la vilaĝo adoras vian Dion kaj fariĝos kristanoj.”

Lun avertis la vilaĝanojn ke ili ne rajtas ŝerci kun Dio. Sed la estro respondis: “Ni estas seriozaj. Ni ĵuras ke ni sekvos vian Dion. Se ne, Li povos juĝi nin.”

Do, la kristanoj preĝis kaj fastis dum tri tagoj. Je la kvara tago, okazis pluvego kiu plenigis ĉiujn kanalojn kaj inundis la rizkampojn. Ĉiuj 134 familioj fariĝis kristanoj.

KAMBOĜO: En la jaro 2000, kristana pastro frontis tre malfacilan taskon. La loĝantoj en unu vilaĝo petis lin ke li preĝu por ke Dio rapide sendu pluvon sur la semojn ĵus semitajn. Sed la loĝantoj el proksima vilaĝo petis ke li preĝu ke ne pluvu dum unu plia semajno ĉar ili ankoraŭ ne finis semi.

Pluvis — sed nur sur la kampojn de la vilaĝo kies loĝantoj finis semi. La loĝantoj de ambaŭ vilaĝoj fariĝis kristanoj kaj estis baptitaj.

GVATEMALO: Meze de senpluveco en la regiono Santiago Atitlan, evangelia pastro anoncis dum diservo ke Dio donis mesaĝon al li, promesante pluvon, sed nur sur la farmbienoj de la evangeliaj kredantoj. Kaj tiu nokto, pluvis. La senkreduloj malkontentiĝis kiam ili vidis la pluvon falantan sur la kampojn de la evangelianoj kaj ne sur siajn.

Jam je la noktomezo, la mesaĝo de Dio estis plene sciita. Amaso da farmistoj iris al la evangelia preĝejo, frapagante al la pordo, kaj postulante eniri por penti siajn pekojn kaj ricevi Jesuon Kriston kiel sian Savanton. Kiam ili faris tion, la pluvo falis ankaŭ sur iliajn kampojn.

RUSIO: Iun vesperon en Asbest je la komenco de serio de evangelizaj diservoj, pluvo komencis fali el nigraj nuboj. La evangelisto David Hathaway preĝis kontraŭ la pluvo kaj anoncis al la amaso ke la suno rebrilos post kvin minutoj. La suno rebrilis — sed la pluvego daŭrigis fali ekster la stadiono!

USONO, ŝtato Nebraska: Ĉi tiu raporto devenas de mia familio. En antaŭa artikolo, mi skribis pri onklino kiu preĝis kune kun siaj amikinoj por mia patro kiu malsanis je la pulmoj. Dio respondis kaj resanigis lin. (DR, n-ro 2, 2014, paĝoj 38-39)

Post la morto de sia edzo, mia onklino transloĝiĝis al proksima urbeto. Ŝi luis sian farmbienon al viro por parto de la rikolto. Per tio ŝi vivsubtenis sin.

Iun someron la pluvoj ne venis. La rikolto estus pereonta kaj la onklino ne havus vivrimedojn. Ŝi havis grandan fidon kaj ŝi preĝis ke Dio sendu pluvon. Sed la pluvo ne falis sur ŝian urbeton!

Kelkajn semajnojn poste, la luento frapis la pordon. “Sinjorino, jen via parto de la prezo por la rikolto.”

“Sed la pluvoj ne falis,” ŝi diris, surprizita.

“Ho jes, Sinjorino,” la viro respondis. “Ĵus al tempo por savi la rikolton, la pluvo falis sur vian farmbienon kaj sur kelkajn kilometrojn ĉirkaŭe!”

“Elija estis homo samnatura, kiel ni, kaj li preĝis fervore, ke ne pluvu; kaj ne pluvis sur la teron dum tri jaroj kaj ses monatoj. Kaj denove li preĝis; kaj la ĉielo donis pluvon, kaj la tero ekproduktis sian frukton.” (La Epistolo de Jakobo 5: 17, 18)

La rakonto pri Elija kaj la pluvo troviĝas en 1-a libro de la Reĝoj, ĉapitro 18. Elija vivis preskaŭ mil jarojn antaŭ la naskiĝo de Jesuo Kristo. Tri mil jarojn post la vivo de Elija, nia Dio ankoraŭ respondas preĝojn kaj sendas pluvon!



Kristoforo, la sanktulo kaj la legendo

Kompilita de Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Sankta Kristoforo estas martiro, sanktulo de Romkatolika Eklezio kaj de ortodoksismo.

Ekzistas diversaj rakontoj pri Kristoforo. Li naskiĝis eble en Likio aŭ en Kanaano. Verŝajne li mortis en 251 p.K. kiam Decio estis romia imperiestro. Sed povus esti ankaŭ pli poste, kiam la Maksimino Daia estis imperiestro inter la jaroj 308-313.

La kulto de Kristoforo disvolviĝis fine de la 5-a jarcento. Unue ĝi aperis en Grekio kaj venis ĝis Francio en la 9a jc. Preĝejoj kaj monaĥejoj frue nomiĝis je lia nomo, sed la kulto pri Kristoforo aperis okcidente nur dum la mezepoko.

La nomo Kristoforo ne estas lia vera nomo, la nomo signifas *Kristoportanto*, do aludas lian rolon. Laŭ kelkaj opinioj Kristoforo kaj Sankta Menas (aŭ Mina) el Egiptio kiu mortis en 309, estas la sama persono. Alia nomo proponita kiel lia origina nomo estas Reprobus.

Plej frua, konata kolorita lignogravurado. El 1423, en Buxheim.



Ĉiukaze li estis altstatura, forta kaj eĉ timiga persono. Li volis servi al la plej potenca reĝo, sed servante al la reĝo konsiderata la plej potenca, li rimarkis ke la reĝo timas la diablon. Do Kristoforo decidis iri por servi al li. Sed vidante ke la diablo evitis krucon timante Kriston, Kristoforo forlasis lin kaj iris por serĉi Kriston.

Ermito instruis Kristoforon pri la kristana kredo kaj kiam Kristoforo volis servi Kriston, la ermito konsilis lin ke li uzu sian grandecon kaj forton kaj transporti homojn tra danĝera rivero.

Sur popularaj portretoj li estas bildigata kun infano sur la ŝultro. Laŭ legendo li enprofundiĝis en fundon de rivero sub la pezo de la infano. Rimarkante tion, la infano respondis al li demando: Vi surportas la tutan mondon, ĉar mi estas tiu, al kiu vi servas helpante al aliaj.

Kristoforo iĝis patrona sanktulo de pontoj, urboj apudriveraj, transportistoj, veladistoj, vojaĝistoj kaj pilgrimantoj, ankaŭ patrono de bona morto – precipe Oriente, kaj nun de ŝoforoj.

Liturgia rememoro en katolikismo estas celebrata la 25-an de julio. Ortodoksa eklezio rememoras lin 9/22 de majo (t.e. la 22-an de majo laŭ gregoria kalendaro). ☩

Fontoj:

https://en.wikipedia.org/wiki/Saint_Christopher

http://www.catholic.org/saints/saint.php?saint_id=36

https://eo.wikipedia.org/wiki/Sankta_Kristoforo

<http://www.alltombibeln.se/bibelfragan/amulett2.htm>

Siegfried Krüger 80-jara



Nia estrarano kaj multjara kasisto Siegfried KRÜGER 80-jariĝos fine de la jaro.

En Strasburgo li prelegis pri Kristoforo. Tiu legendo jam okupas lin de pli ol tri jardekoj: Kiel trovi Kriston.

Apude vi vidas fotojn de la skulptaĵo de Kristoforo, kiun li iniciatis. Ĝi troviĝas antaŭ la ĉefpreĝejo de lia urbo, nome *Kilianskirche* en Heilbronn.

Sur la foto, apud la skulptaĵo, staras Siegfried Krüger (dekstre) kun Pavel Polnický (maldekstre).

Pri la skulptaĵo vi povas vidi filmeton fare de Rolf Gebhardt, laŭ la jena ligo:

<https://youtu.be/SZxhUBqvz8>



Antonin Zhoř, moravia instruisto, verkisto, redaktoro kaj eldonisto, naskiĝis la 1-an de januaro 1896 en Rosice apud Brno. Lia patro estis tajlora majstro. Lia patrino Flora, fraŭlinnome Štikarova, estis filino de urba sekretario. Antonin lernis en baza lernejo, poste tri jarojn en mezlernejo kaj fariĝis instruista helpanto. Ekde la jaro 1910 li studis en instruista instituto en Brno. Unu jaron li instruis en baza lernejo en Oslavany. Rosice kaj Oslavany apartenas al industria kaj ministra regiono de suda Moravio.

La unua mondmilito (1914–1918) signifis intermiton de trankvila instruista laboro. La juna instruisto Zhoř devis forlasi lernejon kaj siajn lernantojn kaj ekservi en aŭstro-hungara armeo. Lia regimento estis baldaŭ forsendita al rusa fronto. Sed moraviano (slavo) Zhoř ne volis batali kontraŭ rusoj, kiuj parolas similan (slavan) lingvon. Tial li volonte kaptiĝis kaj fariĝis ĉeĥoslovaka legiano.

Ekde la jaro 1918 li instruis en Brno. En la jaro 1926 li eldonis aŭtobiografan romanon *Cestou ke svobodě* [Survoje al Libereco] sub la pseŭdonimo Pavel Čermak. Ĉefa sceno de la romano estas renkontiĝo de vundita legiano kun venonta ĉeĥoslovaka prezidento Tomáš Garrigue Masaryk en lazareto post batalo apud Zborov (la 2-an de julio 1917), kie rusoj subgvide de generalo

Brusilov kaj kun helpo de ĉeĥoslovakaj legianoj venkis aŭstro-hungaran armeon. Pro siaj personaj spertoj el rusa militkaptejo, Zhoř ne idealigis rusojn en sia romano *Survoje al Libereco*. Ekzemple rusa komandanto de militkaptita barakaro estas priskribita kiel alkoholulo kaj koruptulo, kiu senskripule profitas de milito kaj mizero de militkaptitoj.

Zhoř sciis, ke infanoj bezonas bonajn librojn. Sed kvalitaj libroj tiam estis tiel multekostaj, ke multe da infanoj (eĉ lernejoj) ne povis ilin aĉeti. Tial Zhoř en la jaro 1929 fondis sian propran eldonejon. Nomo de la eldonejo estis *Epos* [Eposo]. Li eldonis librojn baze de abono, por ke ili ne estu multekostaj. Lia tuta familio helpis al li, sed liaj fortoj baldaŭ ekmankis. La eldonejo *Epos* tial estis unuigita kun eldonista sekcio de Centra Asocio de Instruistaj Unuiĝoj kaj ekestis eldonejo de Antonin Zhoř *Jitro* [Mateno]. La nova eldonejo funkciis eĉ spite al la nazia okupado ĝis la jaro 1948, kiam ĝi estis konfiskita far komunistoj. Ambaŭ eldonejoj (*Epos* kaj *Jitro*) eldonis 73 librojn dum 18 jaroj.

La eldonkvanto sumis 300.000 ekzemplerojn. Antonin Zhoř kiu estis eldonisto, redaktoro, lektoro kaj propagandisto, estis tre rigora kaj neniam cedis kvaliton de siaj libroj.

Antonin Zhoř estis ankaŭ redaktoro

de ĵurnaloj por infanoj. En la jaroj 1937-1942 kaj 1945-1949 li redaktis monatgazeton *Vlaštoviča* [Hirundeto]. En libroeldonejo *Knihovna Vlaštovičy* [Biblioteko Hirundetoj] estis eldonitaj 19 fabelaroj (637 ekzempleroj).

En la jaroj 1945-1949 Zhoř redaktis ankaŭ ĵurnalon por infanoj *Brouček* [Skarabeto]. Humurajn rakontojn por infanoj li publikigis en ĵurnaloj kaj nur post sukceso ĉe infanoj li kreis librojn de tiuj rakontoj.

En sia romano *Honestulo Abe* (1939), kiu estis verkita en komenco de nazia okupado, Zhoř esprimis siajn pensojn pri valoro de libereco kaj homa digno. La romano temis pri la usona prezidento Abraham Lincoln (1809-1865).

En biografiaj romanoj li prezentis al junularo la sortojn de fizikistino Marie

Curie-Skłodowska (1867-1934), komponisto Ludwig van Beethoven (1770-1827), pentristo Jaroslav Čermák (1831-1878), verkistino Božena Němcová (1820?-1862), verkisto Alois Jirásek (1851-1930) kaj Charlotta Garrigue Masarykova (1850-1923).

Lia filo Igor Zhoř (1925-1997) fariĝis vidartisto*, profesoro de la Pedagogia Fakultato de la Universitato Masaryk en Brno, peranto de multaj vidartaj ekspozicioj, kaj en la lasta jaro de sia vivo ankaŭ dekanato de la Fakultato de Vidartoj ĉe la Tehnika Universitato en Brno.

Antonin Zhoř mortis en la jaro 1965 kaj estas entombigita en Centra tombejo en Brno.



* Vidarto aŭ pli simple bildarto estas arto, kiu kreas aĵojn ĉefe perceptataj per la okuloj de la spektanto. Ĝi ampleksas nociojn pri tre diversaj bildokreadoj, dekoracio de objektoj, aŭ scenaj artoj.

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

13. decembro

Ho Dio, riĉa en kompato, mi preĝas por la perditoj, por la vagantoj, por la rifuĝintoj kie ajn, por tiuj, kiuj ne estas akceptataj. Pretigu multajn korojn por helpi ilin. Vi mem konduku ilin al Via patra koro.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 122). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



Rapida vizito al Romo

Vojaĝraporto de Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Fine de aprilo ĉi-primtempe, mi kaj mia edzino plilongigis la semajnfinojn kaj vizitis Romon. Belega urbo! La historio (almenaŭ mia memoro pri ĝi) viviĝas en tia ĉirkaŭaĵo. Kvankam la vizitindaĵoj estas plurcentaŭ eĉ plurmiljaraj, mi tamen spertis ke multo ŝanĝiĝis de post mia junaĝa vizito antaŭ 40 jaroj. Tiom da turistoj!! La modernaj komunikiloj plifaciligas kaj ebligas vojaĝojn.

Komprenoble ni vizitis la katedralon de S:ta Petro, kaj grimpis la altan kupolon kaj vidis la pejzaĝon de Romo. Ni ankaŭ vizitis ne same konatajn preĝejojn ekz. S:ta Maria in Trastevere kaj S:ta Giovanni in Laterano. Riĉaj kaj belaj preĝejoj kun famaj skulptaĵoj. Ankaŭ la muzeo de Vatikano, kun impona kolekto de etruskaj artefaktoj, impresis nin.

Dum nia mallonga restado ni vizitis ankaŭ Carlon SARANDREAN, kiu prizorgas la esperantajn radio-elsendojn

Vespermanĝo kun la grupo de Romo



de Radio Vatikano, kaj li faris kelkminutan intervjuon kun ni. En la esperantogrupo en Romo, kiu konvene kunvenis nian lastan vesperon, prezentis juna rusa astronomia doktora studentino teorion pri stela evoluado. Kvankam teorie altnivela, ŝi sukcesis klarigi al ni, ne-fakuloj, la malfacile observeblan fenomenon, kiu okazas fore super ni.

Tiun vesperon ni kune kun la grupo vespermanĝis en Trastevere kaj poste kuris hejmen en pluvo.



La redaktoro kun Carlo Sarandrea (dekstre), ekster la Radio Vatikano



Belan kristnaskan feston & Sukcesan novan jaron

al ĉiu leganto de Dia Regno deziras
la sekretario & distribuanto kaj la redaktoro

Pavel POLNICKÝ & Bengt Olof ÅRADSSON

Mi tradukis el Dia Regno

Dimanĉ-matene la 8an de novembro, dum la diservo de mia evangelika komunumo, mi povis prezenti la artikolon de DR n°3/2015 pri la televid-elsendo de SAT-7 pri la frato de la 2 koptoj mortigitaj de ISIS (paĝoj 57-58). Estis emocia momento por la aŭskultantoj, sed fid-fortiganta momento. Mi ne propagandis pri Esperanto, sed mi diris ke mi estas ano de kristana asocio kiu havas 300 membrojn ĉirkaŭ la planedo, kiu havas revuon (kiun mi montris), kaj el kiu mi legas (fakte tradukas) tiun artikolon. Multaj el miaj sam-komunumanoj scias ke mi estas Esperanto-uzanto kaj Eo-propagandisto, do mi ne bezonis rediri tion samtempe. Ĉiuj bone komprenis la mesaĝon kaj unu el la plejaĝuloj (eklezi-konsiliano) aldonis ke la Egipta registaro pagis la konstruon de nova kopta preĝejo en la urbeto de la 21 martiroj, por memoro pri ili.

DIA REGNO
MEMBRARO

DIA REGNO
"Ammonata kultura revuo en esperanto" • nro 3 (2015) • 2016 •
KONTA

Ĉi-jare antaŭ –

- 600 jaroj Magistro Jan Hus, estis murdita
- 100 jaroj okazis la Armena Genocido
- 70 jaroj Dietrich BONHOEFFER estis murdita
- 70 jaroj la Dua Mondmilito finiĝis
- 10 jaroj Roger SCHUTZ, Taizé, estis murdita

Samuel Gaillard, FR

— Modra —

(Bazita sur Vikipedio)

Dum la kongreso en Bratislava, la kongresanoj ankaŭ vizitos la urbon Modra. Ĝi situas ĉe la piedo de *Malé Karpaty* [Malgrandaj Karpatoj], laŭ la ĉefvojo kaj fervojo Bratislava-Trnava. Proksimume 9 mil homoj loĝis tie en 2005.

La unuaj spuroj de loĝado reiras al la 3-a jarmilo a.K. La unua mencio troviĝas en dokumento de 1158, kiam hungara reĝo Géza II donacis la lokon al la episkopo de Nitra.

La komunumo detrujiĝis fare de tataroj en 1241. Mateo Csák havis la tutan regionon inter 1300-1321. Tiu-tempe la loĝantaro jam okupiĝis pri vinkulturado. En 1361 la komunumo urbiĝis, kaj en 1569 iĝis ankaŭ kampurbo ricevinte la titolon de Maksimiliano II (Sankta Romia Imperio). En 1607 la urbo ricevis altan rangon – libera reĝa urbo.

La urbo estis luterana episkopejo inter 1741 kaj 1934.

La ceramika industrio kaj precipe la *majoliko*-produktado komenciĝis en la 19-a jarcento kaj en 1883 lernejo de ceramiko estis establita, kie, per la majstreco de la Habanoj (=huteranoj), la t.n. *Slovaka ceramiko* naskiĝis.

En Modra okazis pluraj esperantaj eventoj dum la lastaj jaroj.



Urbopordego de Modra



Parto el la placo en Modra



Ceramiko

Huteranoj

(Bazita sur Vikipedio)

La huteranoj estas anabaptista eklezio, fondita de Jakob Hutter kaj liaj sekvantoj. Modelo por ili estis la Jerusalema prakomunumo. Iliaj doktrino kaj kredopraktiko ofte devigis ilin elmigri, ekde la fondado de la religio en la jaro 1528. Nuntempe, la 45.000 membroj (novhuteranoj inkludite) loĝas preskaŭ ekskluzive en Usono kaj Kanado. Ili ankoraŭ parolas la huteranan lingvon, antikvan dialektecan formon de la germana, kiel gepatra lingvo.


Devenaj en la aŭstria provinco de Tirolo en la 16a jarcento, la frontuloj de la huteranoj migris al Moravio por eskapi persekuton. Tie, sub la ĉefeco de Jakob Hutter, ili evoluigis la komunuman formon de loĝado bazita sur la Novtestamentaj libroj de Agoj kaj 2 Korintanoj – kiu distingas ilin de aliaj rebaptistoj, ekzemple la amiŝoj kaj menonitoj.

Baza dogmo de la huterana socio ĉiam estis absoluta pacismo, malpermesante al la membroj partoprenadi en militaj aktivecoj, prenante ordonojn,

portante formalan polican aŭ soldatan uniformon aŭ kontribui al militaj impostoj. Tio kondukis al forpelo aŭ persekutado en pluraj landoj en kiuj ili vivis. En Moravio la huteranoj prosperis pli ol jarcento, ĝis persekutado, kaŭze de la aŭstria transpreno de la ĉeĥaj landoj, kio devigis ilin denove migri, unue al Transilvanio, kaj poste, en la frua 18-a jarcento al Ukrainio. Kelkaj huteranoj konvertiĝis al katolikismo kaj retenis apartan etnan identecon en Slovakio kiel *Habanoj* ĝis la 19-a jarcento. Ĉe tiu tempo la nombro de huteranoj estis falinta al ĉirkaŭ 100.

En Ukrainio, la huteranoj ĝuis relativan prosperon. Ilia karakteriza formo de komunuma vivo estis influita de najbaraj rusaj menonitoj. Post iom da tempo, Rusio enkondukis novan devigan militservan leĝon, kaj la premo sur la huteranoj revenis.

La suba mapo montras migradajn vojojn de la huteranoj, kaj i.a. montras ke ilia “vojo” tra iris Slovakion. ☞



Migrado de la huteranoj en Europo. Propra verko de Karlis /Vikipedio

Membriĝo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno per pago de la kotizo kaj sendo de la adreso al la kasisto

Kotizoj de KELI 2016

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI	16,00 EUR
per libroservo	18,00 EUR
KELI-anoj rajtas aboni ESPERO KATOLIKA pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni DIA REGNO pere de C.O. de IKUE	10,00 EUR
Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj	3,00 EUR
Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n)	Donaco

La liga gazeto Dia Regno aperas 6-foje jare

Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtgire al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, kaj menciu:
por KELI-konto **kelk-p**
konto-numero en Belgio: 000-163 1831-97
Germanio, Köln: 3182 91 509, BLZ 370 100 50
Svedio: 74374-0
Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, menciu:
por KELI-konto **kelk-p**: BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 378 564
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:
Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;
① +36 302 000 306; ✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Membriĝo ĉe KELI (kaj la nacia sekcio) per la landa
reprezentanto, kiun vi bonvolu kontakti.

Landaj kotizoj:

Britio:	15 GBP	
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006		Jean Bisset, 47 Airbles Crescent,
“Fellowship of British Christian		Motherwell, ML1 3AP;
Esperantists (FBCE). Kasisto: S-ino		✉ jean@bisset100.freeserve.co.uk

- Bulgario** *)
 Peranto: S-ino Ivanka Kircheva
 Stoyanova
 P.O. Box 701, BG-9000 Varna
 ☎ + 359 52 639628,
 ✉ ivanka_esperanto@abv.bg
- Ĉeĥa Respubliko** 300 CZK
 kaj
Slovaka Respubliko 15 EUR
 Peranto: Pavel Polnický, Lidická
 939/11, CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
 , ☎ +420 311 241 406,
 ✉ polnickypavel@seznam.cz
- Estonio** *)
 Peranto: Endel Ojasild, PK. 24,
 EE-10502 Tallin,
 ✉ endel.ojasild@gmail.com
- Finnlando** 30 EUR
 Eblas aboni Dia Regnon uzante
 landan peranton de UEA aŭ laŭ la
 pagmanieroj menciitaj sur antaŭa
 paĝo.
- Francio** 25 EUR
 CCP n-ro 10 456 15 U Paris,
 “Franca Evangelia Esperanto-Ligo
 (FEEL)”. Kasisto: Samuel Gaillard
 5 rue Maurice Ravel,
 FR-63800 Courmon d’Auvergne
 ☎ +33 (0)4 73 84 31 31,
 ✉ samuel.gaillard@ac-clermont.fr
- Germanio** 24 EUR
 Evang. Darlehnsgenossenschaft
 Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37
 “Esperanto-Liga für Christen in
 Deutschland e.V.”
 Kasistino: Hedwig Fischer, Gustav-
 Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde,
 ☎ 02573 / 626,
 ✉ hetifisch@googlemail.com
- Hungario** *)
 Peranto: Irén Bagi, Baross u.
 54/B.II.8, HU 1201 Budapest
 ☎ 01 283 6566
- Japanio** 20 EUR
 (aerpoŝte + 3 EUR)
- Korea Respubliko** 20 EUR
 (aerpoŝte + 3 EUR)
- Nederlando** 20 EUR
 (por membroj de KUNE +5 EUR)
 Poŝtbankkonto n-ro 108 75 75
 “Chr. Esperanto Verg. KUNE”
 Kasistino: Gerda Dercks,
 Molenstraat 20, 7607 AL Almelo
 ☎ +31(0)546 819 403,
 ✉ gcamdercks@home.nl
- Pollando** 30 PLN
- Rumanio** *)
 Peranto: Maria László, OF1.C.P.
 38 Exterior, 4800 Baia-Mare
 ☎ 062 426182,
 ✉ laszlo_maria@yahoo.com
- Rusio** *)
 Peranto: Larisa Kuzmenko,
 Kuŝvinskaja 25 A, 622013 N. Tagil,
 Sverdlovskaja Obl. Rusio,
 ✉ klarisa8@yandex.ru
- Slovaka Respubliko** (vidu ĉe Ĉeĥa
 Respubliko) *)
- Svedio** 250 SEK
 Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-0
 “Kristliga Esperantoförbundet”
 Kasisto: Bengt Olof Åradsson,
 Nygatan 10 A, lgh 1102;
 S-281 48 Hässleholm; Svedio
 ☎ +46 (70) 2004574;
 ✉ dr_board@yahoo.se
- Svislando** 20 EUR
 Pagu al la svislanda UEA-konto
 (vidu antaŭan paĝon, punkto 2)
- Usono** 30 USD
 Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton
 al la peranto: Jerald T. Veit, 3578
 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207
 ✉ jeraldveit@yahoo.com

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto

Informoj

Tondaĵo el la novembra rondletero de Julia Sigmond

KVODLIBETO

Kvankam en la mondo konstante okazas teruraĵoj, kiujn aferojn ekvilibri per bonaj reagoj estas neimageble malfacila tasko. Mi, laŭ miaj eblecoj kaj kapabloj, ĉion provas fari, por fortigi la pozitivan flankon de la vivo.

Bonvolu pardoni al mi, ke ŝajne mi memlaŭdas, sed mi devas sincere konfesi, ke mi estas ne nur feliĉa kaj kontenta, sed samtempe eĉ fiera. Jen la kialo: Mi sukcesas aperigi en decembro nian duan komunan libron kun Filippo!

Ĝia titolo: *Kvodlibeto* kun la subtitolo: *kvarmana mikspoto dutonala*.

Ĝi havas sep partojn: 1. Rakontoj, 2. Politiko, 3. Vivospertoj, 4. Esperanto, 5. Recenzoj, 6. Muziko, 7. Animaloj.

Ĝi estas 340 paĝa volumo.

Vizito al Britta Rehm

Dum la aŭtuna libertempo, mia familio vizitis Gotenburgon, en okcidenta Svedio. Krom la kutimaj turistaj vizitoj ĉe amuzejo kaj muzeoj, ni ankaŭ kaptis la eblecon renkontiĝi kun Britta Rehm, iama KELI-estranano kaj



ofta kongrespartoprenanto, sed la lastajn jarojn ŝi ne povis partopreni. Ŝi ĉi-jare festis sian 85-jariĝon.

Estis por ni ĉiuj, bona kaj agrabla momento renkontiĝi kun Britta denove.

Tekniko inter generacioj. André montras al Britta kiel funkcias tabulkomputilo.

Ĉu vi scias ?

– kaj kion ci diras pri:



(Ĉerpita el Vikipedio, kapvorto ‘@’)

La signo @ estas simbola mallongigo aŭ ligaturo por la latina vorto *ad* [ĉe], historie ofte uzata en anglalingvaj landoj por la samsignifa angla vorto *at*, kiu donis ankaŭ la anglan nomon de la simbolo. Ĝia formala angla nomo *commercial at* [komerca ĉe] devenas el komerca uzo en anglalingvaj fakturoj kun la signifo ‘po’, ekz. ‘7 widgets @ £2 ea. = £14’ [7 umoj po 2 pundoj egalas 14 pundojn].

Ĝia Esperanta nomo ‘heliko’ devenas de la simileco kun konkohava heliko. La alternativa nomo ‘ĉe’ estas rekta traduko el la angla/latina, kaj de tempo al tempo uzatas kun la signifo ‘ĉe’ en poŝtelefona lingvo, sloganoj k.s., ekzemple ‘E@I’.

Ĝia nun plej ofta uzo estas en ret-poŝto, elektronika adreso, kiel ekz. en ‘sinjoroxy@mondo.net’ [legu: ‘sinjoro xy ĉe mondo punkto net’]. Uzadon de tiu ĉi simbolo en elektronika poŝto enkondukis Ray Tomlinson en la jaro 1972. Por multaj homoj ĝi iĝis simbolo por la Interreto.

@ en Esperanto, ĉu ‘ĉe’?

Esperantistoj uzas diversajn versiojn de la elparolo, krom ‘heliko’ ankaŭ ‘simiovosto’, ‘at’, ‘ĉe’ kaj aliajn. Entute montriĝis kaoso, kiu estas unuflanke maldezirenda, aliflanke malhelpas bonan interkomprenon.

Nun ekzistas la tendenco uzi pli ofte ‘ĉe’. Tio estas la rekta traduko de la angla *at* kaj de diversaj aliaj nacilingvaj similaj esprimoj.




Listo de aliĝintoj al 66-a KELI kongreso Bratislava, Slovakio, 16. – 23. 7. 2016


1. Farkas Antal,	Rumanio	9. Scurt T. Ildiko,	Rumanio
2. Stamm Sieglinde,	Aŭstrio	10. Cousson Philippe,	Francio
3. Popoviciu E. Ecaterina,	Rumanio	11. Birta Szabolcs,	Rumanio
4. Ojasild Endel,	Estonio	12. Polnický Pavel,	Ĉeĥio
5. Fischer O. Arnošt,	Ĉeĥio	13. Pospíšil Václav	Ĉeĥio
6. Stier Gabriella,	Rumanio	14. Åradsson Bengt Olof	Svedio
7. László Maria,	Rumanio	15. Åradsson André	Svedio
8. Olah M. Judita,	Rumanio	16. Ráczkevy-Eötvös Ágnes	Hungario

Mia preĝo


HERR, MEIN BETEN




Mi - a pre-ĝo va - lo - ru an - taŭ
germane: Herr, mein Be - ten — stei - ge zu dir



Vi ki - el in - cen - so, kaj la
auf — wie Weih - Rauch, wie das



lev' de mi - aj ma - noj ki - el ves -
Op - fer am A - bend, wenn ich mei - ne



pe - ra o - fer - do - no.
Hän - de er - he - be.

Psa 141,2

HERR, MEIN BETEN • nGL 98 • M kaj aranĝo: © Matthias Kreuels (* 1952) • E-adapto:
Albrecht Kronenberger 2015-07-21 • kun afabla permeso de la Komponisto

KRISTANAJ FONTOJ:

http://dli-info.net/urban/static/kantoj/Mia_pregho_valoru.pdf